



1910 յ.

I J A R O

15/28 de Junio.

«KAUKAZA ESPERANTISTO»

Jarabono 1 rublo—1.06 sm.

Tarifo por anoncoj: 1 paĝo—6 rub., 1/2 pĝ.—3 r. 1/4 pĝ.—1 r. 50 kop., 1/8 pĝ.—75 k., 1/10—50 k.

Adresoj de samideanoj 10 k.  
Adreso: Tiflis. Pasajo de Puškin. Aĵk Ter-Astvacatriane.

«НАВКАЗСКИЙ ЭСПЕРАНТИСТЪ»

Во годъ 1 рубль. Объявленія: страница—6 руб., 1/2 стр.—3 р., 1/4 стр.—1 р. 50 к., 1/8 стр.—75 к., 1/10 стр.—50 к.

Адресъ: Тифлисъ, Пушкинскій Пассажъ Айку Теръ-Аствацатрянцу.


«ԿՈՂԿԱՍԵԱՆ ԵՍՔԵՐԱՆՏԻՍՏ»

Տարեկան բաժանորդագինը 1 ռուբլի:

«ԿԱՅՅԱՅՈՒՆ ՄԱՅՐԱԳԵՆԻՍԻՍ»

Մշակութային լուսին 1 մսնդա.

Редакция открыта ежедневно по вечерамъ отъ 5—7 ч.



«AL AÜGSBURG-ANOJ».

Saluton al Vi. malproksima frato, Mi sendas hodiaŭ sincere el kor'; Mi ege deziras, ke estu homaro Kontenta kaj ĝoja de via labor'.

Labor' fruktodona, amika kaj p-ca En koroj de l' homoj vekig-ig esper'; Vi sentu Vin ĉiam fervora s-ml-ca Je l'nomo de l'sankta komuna afer'.

De l' nia sukceso Vi estas nun fondo,— Vin gardu mem Dio, felico kaj fort'; Kaj samideanoj do ĉiu en mondo Vin benos en koro dankeme ĝis mort'.

Forgesu ripozon, laboru konstante;  
Konduku Vin ĉiam spirita lertec';  
Antaŭen rapidu Vi, nur esperante,  
Ke venos feliĉa por ni estontec'!

Fino P. Pavlova



## P E N S A N T O

De Ĉehov

Estas varmega tagmezo. Eĉ sonoj kaj movadoj malestas en aero... tuta naturo kvazaŭ similas al unu tre granda bieno forgesita de Dio kaj homoj... Sub mallevita foliaro de maljuna tilio, staranta apud loĝejo de mallibereja observisto Jaŝkin, apud malgranda tripeđa tablo sidas mem Jaŝkin kaj lia gasto, ŝtata konsilanto de distrikta lernejo Pimfov. Amabaŭ ili estas sen surtutoj; iliaj veŝtoj estas disbutonumitaj; vizaĝoj ŝvitaj, ruĝaj kaj senmovaj: ilia kapableco por ia ajn esprimado estas paralizita per varneco... Vizaĝo de Pimfov tute acidigis, kaj malsupra lipo malsupreniĝis. En lia frunto kaj okuloj ankoraŭ montriĝas ia agado: ŝajnas, ke li pensas. Ili ambaŭ rigardas unu la alian, silentas kaj esprimas siajn turmentojn per spirego kaj batoj de manplatoj sur muŝojn. Sur tablo staras karafo kun brando, kuirita viando kaj skatolo de haringoj kun griza salo... Ili jam trinkis unu, du, tri k. t. p. glasojn da brando...

—Jes-ss! elparolas subite Jaŝkin, kaj tiel neatendeble, ke hundo, dormanta proksime de tablo, ektermas kaj subprenas la voston, kaj kuras flanken.

—Jes-ss!—Kion vi ne diru, Filipij Maksimoviĉ, sed en rusa lingvo estas multe da superfluaĵ interpunkcioj!..

—Kial-do? modeste demandas Pimfov, elprenante el glaseto flugileton de muŝo. Kvankam estas multe da gramatikaj signoj, sed ĉiu el ili havas sian apartan signiton kaj lokon...

—Lasu, vi ĉi-tion! Ili tute ne havas ian signifon... Nur unu kvazaŭa saĝegeco... Iu metos dek komojn en unu linio kaj pensas, ke li estas saĝa... Ekzemple, amiko de prokuroro Merinov post ĉiu vorto metas komon... Pro kio estas ĉi-tio?...

Estimata sinjoro—komo, mi rimarkis—komo, ke arestitoj—komo... Fi! Nur punktoj flugas antaŭ okuloj! En libroj ankoraŭ estas tio-ĉi... Punkto, komo, dupunkto, kaj diversaj komajoj... Estas ur abomene legi... Eble ankoraŭ ia dando, por kiu unu punkto ne sutiĉas, prenos kaj metos ilin eĉ centon... Pro kio-de ĉi-tio estas bezona?

—Scienco postulas ĉi-tion... Ekspiris Pimfov.

—Scienco... Ĝi estas saĝmallumigo, sed ne scienco...

—Oni elpensis ilin sen ia celo... nur por ĵeti polvon en okulojn de leganta publiko... Ekzemple, litero ĵatj (unu el tri rusaj e) malestas en ia ajn alinacia lingvo, sed en Rusujo ĝi estas... Por kio ĝi ekzistas, oni demandas?... Skribu, ekzemple, vi rusan vorton «pano» per ĵatj aŭ simpla e, ĉu ne estas egale?..

—Dio scias, kion vi parolas, Elio Martiniĉ! Sulkiĝis Pimfov.—Kiel do skribi vorton «pano» per simpla e? Se oni tiel komencos skribi, tiam legi estós malplaĉe! Pimfov trinkas unu glason da brando kaj ofeudite palpebrumante deturnas flanken sian vizaĝon. La protestoj kontraŭ la gramatiko, videble lin ofendis...

—Ho, kiel oni min vergis, pro ĉi-tiu diabla ĵatj! daŭrigas Jaŝkin! Mi memoras ĵen ĉi-tion: unu fojon min elvokas instruisto al nigra tabulo kaj diktas: «Kuracisto forveturis urbon». Mi skribis vorton «kuracisto» per simpla e. Li vergis min. Post unu semajno li reelovkis al tabulo kaj diris, skribu: «kuracisto forveturis urbon». Mi skribis vorton

«kuracisto, je ĉi-tiu fojo, per jatj! Li ankoraŭ min vergis...

—Pro kio do vi vergas min, Johano Tomasoviĉ? demandis mi. Pardonu!... Estu malsevera, vi do mem diris al mi, ke ĉi-tiun vorton oni devas skribi per jatj!... «Ho, tiam, diras li, mi eraris, traleginte do hieraŭ verkon de unu akademiano pri jatj en vorto «kuracisto», mi tute konsentas kun akademiano kaj akademio de l'scienco.

Mi do vin vergis pro l'devo de ĵuro...

Nu, li vergardis min... Kaj ankaŭ ĉe mia Basiĉjo ĉiam orelo estas ŝvelita dank'al ĉi-tiu jatj... Se mi estus ministro, mi do nepre malpermesus tiel turmenti homojn pro ĉi-tiu diabla jatj.

—Ĝis revido! ekĝemis Pimfov, palpebrumante kaj vestante «rtuton». Mi ne povas aŭskulti, kiam oni parolaĉas pri scienco...

—Nu, nu, nu... tiel rapide vi ofendiĝis! Jaŝkin kapatas lamaniko de Pimfov. Mi ja diris ĉi-tion nur por parolado... Nu, sidiĝu, ni trinku ankoraŭ unu!...

Ofendita Pimfov sidiĝas, trinkas kaj turnas flanken sian vizaĝon. Regas silento. Preter drinkantoj, kuiristino Feono portas lavvazon kun kotakvo. Aŭdiĝas kotakva plaŭdo kaj ankaŭ krieto de l' malsekigita hundo. La senviva vizaĝo de Pimfov pli acidigas. Sur la frunto de Jaŝkin kolektiĝas sulkajoj. Li koncentriĝinte rigardas viandon kaj pensas... Aliras al tablo invalido malĝoje rigardas karafon, kaj ekvidante, ke ĝi estas malplena, li alportas novan porcion... Ankoraŭ ili trinkas...

Jes-ss! diras subite Jaŝkin. Pimfov ektremas kaj timiĝinte rigardas je Jaŝkin. Li atendas novan proteston.

—Jes-ss! ripetas Jaŝkin, pens-eme rigardante je karafo. Laŭ mia opinio ankoraŭ estas multe da superflujaj sciencoj...

—Kiel do ĉi-tion kompreni? mallaŭte demandas Pimfov. Ankaŭ sciencoj laŭ via opinio, estas superflujaj?

—Ĉiaj... Ju pli multe da sciencoj scias la homo, des pli li revas nur pri si... Ili nur aldonas al homo pli da fiereco... Mi do, ĉiaflanke, ĉiujn ĉi-tiujn sciencojn... hm... hm... pendigus... Nu, nu, vi do volas ankoraŭ ofendiĝi... Kiu vi estas, je Dio, ofendiĝema, eĉ unu vorton mi ne povas diri? Nu, nu, sidiĝu, ankoraŭ ni trinku, unu, du!...

Aliras Feono kaj kolere puŝante flanken per siaj kubutoj, metas antaŭ amikoj pladon da verda brasika supo. Komenciĝas laŭta sorbado kaj maĉado. En tiu-ĉi momento kvazaŭ el tero elkreskiĝas tri hundoj kaj kato. Ili staras antaŭ tablo kaj kortuŝete rigardas maĉantajn buŝojn. Post brasika supo sekvas lakta kaĉo, kiun Feono metas kun tia kolero, ke de tablo falas kuleroj, panpecetoj. Dum kaĉmanĝo amikoj silente trinkas.—Ĉio en tiu-ĉi mondo estas superflua, rimarkas subite Jaŝkin. Pimfov faligas sur genuojn kuleron, timiĝinte rigardas je Jaŝkin, volas protesti, sed lia lango senfortiĝis de malsobro kaj kunmiksiĝis kun densa kaĉo... Anstataŭ lia kutima „kiel-do, ĉi-tion-ss?“ nun estas aŭdata nur unu blekado...—Ĉio estas superflua... daŭrigas Jaŝkin... Sciencoj, homoj... malliberejaj institucioj, ĉi-tiuj muŝoj... eĉ kaĉo... kaj ankaŭ vi estas superflua... Kvankam vi estas bona homo kaj kredas Dion, sed vi ankaŭ do estas superflua... Ĝis revido, Elio Martiniĉ! balbutas Pimfov, prenante surtuton...—Jen ni nun malsobriĝis, tromanĝis, sed por kio ĉi-tio estas bezona? Jes... ĉi-tio estas superflua... Ni manĝas, sed ni mem ne scias por kio... Nu, nu... vi ankoraŭ ofendiĝis! Mi ja diris al vi nur por parolado... Sed kien vi volas iri?.. Sidiĝu, ni malmulte ankoraŭ disputu... kaj poste ni trinku!.. Komen-

ĉiĝas silento; iafoje ĝi interrompiĝas per tinto de l'glasetoj kaj ebria krieto... Suno komencas subiri okcidenton kaj ombro plikreskas kaj kreskas... Alvenas Feono kaj, spirblovante, akrasone svingante per manoj, sternas apud tablo tapiŝeton... Amikoj silente trinkas ĝis fino, kaj poste kuŝiĝante sur tapiŝeton kaj, turniĝante unu al alia dorse komencas dormeti...

—Gloron al Dio, pensas Pimfov,— hodiaŭ li ne disputis pri mondkreado kaj hierarĥio... Ho, mi pri tio tre timis!...

Trad. V. Gogitidze



## SUR MARBORDO

Ludas maro, bruas maro,  
Kaj ondiĝas la akvaro;  
Facilvento la petola  
Flugas ĝoje, flugas vole...

Kaj trankvile mi rigardas  
Ŝaŭmon brilan kaj jam aŭdas,—  
Kvazaŭ diras, murmuretas  
Ondoĵ unu al alia:

—„Jen do, ondoj, ĉu vi vidas,  
Sur marbordo fraŭlo sidas;  
Diru ni al li pliĉarme:  
Vin ni amas, amas varme!..“

Kaj ravinte, ridetinte,  
Fortforkuris ili ree...  
Ho, se ankaŭ mi ond' estus,  
Ho, ĉe ond' mi ĉiam restus!..

Ŝrind



Ni petas ĉiujn samideanojn sendi al ni sciigojn pri la esperanta movado en siaj urboj por presi ilin en „Kaŭkaza Esperantisto“.

La cirkulero de la  
1-a KONGRESO  
de  
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Augsburg (Bavarujo)  
28 Julio—3 Aŭgusto 1910  
(Al esperantistoj).

Ni havas la honoron inviti vin partopreni en la 1-a Kongreso de U. E. A. (por Eŭropo), kiu okazos en Augsburg (Bavarujo) de la 28-a de Julio ĝis la 3-a Aŭgusto 1910.

La celo de tiu unua Kongreso de nia Asocio estas duobla: unuflanke interŝanĝi ideojn kaj projektojn pri la plivastigo de U. E. A., aŭdi pri ĝia nuna situacio, ĝiaj metodoj, ĝiaj principoj, fiksi la grandajn liniojn de ĝia laboro dum la venonta jaro, esprimi la bezonojn kaj dezirojn de la Esperantianoj laŭ kiuj la Komitato poste agados; aliflanke ebligigi pli intiman konatiĝon kaj amikiĝon inter niaj ĉiuregionaj membroj, ilin alproksimigi dum kelkaj tagoj tiel ke ĉiu povu profiti la sperton de la alia kaj per tin kunlaborado, kiun ebligas la dumkongresa kunvivado, pligrandigi la senton de solidareco inter Esperantianoj kaj la fervoreco pri U. E. A.

La urbo Augsburg kuŝas en la centro de Eŭropo; ĝi do estas facile alirebla por ĉiuj popoloj. Plie, krom la labora parto interesa kaj originala, la Kongreso prezentas ne kompareblajn allogaĵojn, kiuj solaj valoras la vojaĝon Augsburgon: vizito de la mondfamaj reĝaj kasteloj de Füssen-Neuschwanstein kaj, tuj post la Kongreso, ekskurso al Munĥeno, Oberammergau, kie okazas la tutmonde konataj Ludoj de la Kristisufereco (nur ĉiudekjare) kaj al Bavariaj Alpoj, en plej favoraj kaj certe neretroveblaj kondiĉoj.

La loka organizantaro fervore laboras

por la aranĝo de la Kongreso kaj oni de nun povas esti certa pri gastema kaj gamideana bonakcepto.

Dum la sama epoko okazos en Augsburg Kongresoj de Germana Esperantista Asocio, de Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio kaj aliaj fakaj societoj.

Ni do esperas, Kara Samideano, ke vi bonvolos fari ĉion eblan por ĉeesti en tiu grava manifestado kaj sendi al ni kiel eble plej rapide la ĉikunan aligilon.

**GRAVA AVIZO.**—La personoj, kiuj tute ne povas ĉeesti la Kongreso estas insiste petataj mendi helpkongresan karton po 1 sm. Tin karto celas faciligi la finanĉan aranĝon de la Kongreso; ĝi rajtigas al senpaga ricevado de la Kongresa Raportaro. Personoj, kiuj aliĝas kiel helpkongresanoj, povas ĉiam poste aliĝi kiel Kongresanoj, pagante 2 sm. plue.

**Provizora programo de la Kongreso.**

Honora Prezidanto: S-ro Wolfram, ĉefurbestro de Augsburg.

**Ĵaŭdon 28 Julio.**—5 h., Solena Malferma Kunveno.—7 h., Granda komuna festeno.

**Vendredon 29.**—9 h. 1/2, 1-a Labora Kunveno (pri Administra fako).—3 h., 2-a Labora kunveno (pri Financa fako). Vespere. Amuzaĵoj.

**Sabaton 30.**—9 h. 1/2, 3-a Labora kunveno (pri fakoj konsuloj et Esperanto-Officejoj).—3 h., 4-a Labora kunveno (pri Junula fako). Vespere: Mitingo kaj paroladoj.

**Dimanĉon 31.**—Komuna ekskurso al la reĝaj kasteloj de Neuschwanstein kun komuna manĝo.

**Lundon 1-a Aŭgusto.**—9 h. 1/2, 5-a Labora kunveno (pri komerca fako).—3 h., 6-a Labora kunveno (pri komerca fako).—5 h. 1/2, Malfermo de la Kon-

greso de Teka.—8 h. 1/2, Granda Vesperfesto.

**Mardon 2.**—9 h. 1/2, 7-a Labora kunveno (pri turisma fako).—3 h., Ferma kunveno; alprenado de la dezirespriroj.—5 h. 1/2, kunveno de Teka.—7 h., Granda komuna festeno.

**Merkredon 3.**—Kunvenoj de Teka kaj diversaj Esperantaj Asocioj kaj Entreprenoj.—Ekzamenoj de la Instituto de Esperanto.

**Ĵaŭdon 4, Vendredon 5, Sabaton 6.**—Vizito de Munĥeno.

**Dimanĉon 7.**—Vizito al la prezentado de Oberammergau kaj eventuale ekskurso al Bavaraj Alpoj.

**Kunvenoj.**—La Kunvenoj okazos en la belega hotelo 3 Mohren. La detala tagordo de tiuj kunvenoj aperos en «Esperanto» kaj estos sendata al ĉiuj kongresanoj.

**Loĝado.**—Estos eldonataj 3 klasoj de kuponaroj \*). En ĉiu kuponaro estas entenataj 6 punktoj, kiu frua matenmanĝo, tagkaj vespermanĝoj dum la tuta kongreso kaj ekskurso al Neuschwanstein (kun vagonaro, vizitado de la reĝaj kasteloj kaj manĝo). La fruaj matenmanĝoj okazos en la hoteloj; la festenoj en la hotelo 3. Mohren, kaj la komunaj ĉiutagaj tag. kaj vespermanĝoj en bierhalo. La diferenco de prezo inter la tri klasoj estas kaŭzata de la diverseco de la ĉambroj; la manĝoj kostos saman prezon por ĉiuj kongresanoj. Oni rimarku, ke la kosto de la ekskurso (10 Sm) estas entenata en la kuponaro.

**Vojaĝoj.**—Jen la kosto de la vojaĝo Augsburgon de kelkaj urboj:

Basel, II-a klaso Sm 12,60, III-a klaso Sm 8,20; Genevo, II-a 17,85, III-a 12,15; Marseille, II-a Sm 32,95, III-a

\*) I-a klaso Sm 23, II-a klaso Sm. 20, III-a klaso Sm 18.

16: Milano, II-a 23,30, III-a 14,10; Genova, II-a 25,10, III-a 16,95; Nancy, II-a 14, III-a 9; Parizo, II-a 24, III-a 16,05; Bruselo, II-a 21,25, III-a 13,40; London II-a 34,35, Rotterdam, II-a 22, III-a 14,25; Hamburg, II-a 17,85, III-a 11,60; Breslau, II-a 18,75, III-a 12,20; Praha, II-a 13,20, III-a 7,70; Wien, II-a 15,85, III-a 9; Budapest, II-a 24,45, III-a 12,75; Firenze, II-a 25,90, III-a 16,20.

Por ricevi la prezojn de iro kaj reiro oni duobligu la suprajn prezojn.

La personoj, kiuj dezirus uzi rondvojaĝan bileton, trovos la necesajn informojn ĉe la stacidomoj de la ĉefaj urboj.

Kongreskartoj.—La Kongreskarto kostas 3 Sm. Ĝi rajtigas al ĉeestado je ĉiuj kunvenoj kaj senpaga ricevado de la dokumentoj; ĝi estas necesega por la ricevo de la kuponaro.

Karto de helpkongresano kostas 1 Sm; ĝi rajtigas je senpaga ricevado de la dokumentoj; ĝi estas difinita por la personoj, kiuj ne veturas al la Kongreso. Helpkongresanoj povas ĉiam fariĝi kongresanoj, pagante 2 Sm pluajn.

Adreso: Centra Oficejo de U. E. A., 10, rue de la Bourse, Genève (Suisse).



### HUMORAĴA FAKO

La servisto estis tre malsata, tial li manĝis unu piedeton de kuirita kokino. Je la tagmanĝo la sinjoro ekvidis, ke mankas unu piedeto. Li demandis:

—Kie estas unu piedeto de la kokino?

—Sinjoro, hodiaŭ kiam mi aĉetis, ĝi havis nur unu piedeton.

—Ho, malsaĝulo, ĉu povas esti unu-pieda kokino?

En tiu momento, la servisto ekvitis unu kokinon, kiu staris en la korto sur unu piedeto. La servisto montrante ĝin, diris:

—Jen, sinjoro, rigardu!

La sinjoro, forpelis la kokinon, kaj ĝi stariĝis je alia piedeto surteren kaj forkuris.

—He, sinjoro, kiam mi aĉetis la kokinon, mi ne provis forpeli ĝin.

\*

Molla \*) Nasredin havis du bovidojn. Foje unu el ili forkuris; kaj kiam li sufiĉe persekutinte ne povis kapti ĝin, returnis hejmen, prenis vergon, kaj komencis kruele bati la restintan hejmebovidon. Lia edzino miris, kaj demandis:

—Bonulo, kion faris ĉi-tiu? kial vi batas ĝin?

—Vi ne scias; se tiu-ĉi bovido estus anstataŭ alia ĝi forkurus pli rapide.

Esperantigis S. Hajjan

\*

—Kial vi ploras, Vaĉjo?

—Vi donas al Nikolĉjo fiŝoleon kaj laksilon, sed al mi—nenion.

\*

Doktoro.—Kiel estas la sano de Via edzo?

La edzino de paciento.—Bone, Sinjor\* doktoro, bone! La kuracilo bone helpis, la termometro—tute helpis; kiam mi ĝin metis, matene li levigis! Mi tre dankas vin pro termometro, tre bone efikis!

\*

—Hieraŭ estis terura varmeĝo: 30° en ombro!

—Mi ne komprenas, kiu vin devigas iri en ombron?

\*

En hotelo.

Mastro.—La ĉambro kostas 60 Spes-

\*) Tatara pastro.

milojn-monate. Se vi ĉiusemajne deziros novajn littukojn—tiam 2 spesimilojn plie.  
Gasto.—Kaj se mi dormos sen littukoj?

Esperantigis L. Skrzinski

Unu sinjoro venis al sia maljuna najbaro kaj petis lin prunti al li por kelka tempo lian azenon.

—Ĝi ne estas hejme,—respondis la najbaro.

Dume la azeno ekkriis en la korto.

—Kiel ĝi ne estas hejme? ĝi ja krias en la korto.

«Kiel! Vi kredas la azenon pli ol min—la grizbarban maljunulon? ekkoleris la najbaro.

Unu sinjoro vivis tre malriĉe.

Unu fojon nokte lia edzino aŭdas, ke en la domon venis ŝtelisto, kaj ŝi diras al la edzo.

—Aŭskultu, al ni venis ŝtelisto. Leviĝu rapide!

«Silentu! Lasu, ke li serĉu, eble li trovos ion. Tiam ankaŭ ni ricevos parton.

La najbaro de unu riĉulo bezonis monon. Li venis al la lasta kaj petis prunti al li cent rublojn.

—Vi nenion plu volas? demandis la riĉulo.

«Jes, ankoraŭ mi havas peton,—respondis li,—difinu limtempon ne malpli ol tri monatoj por repagi al vi tiun-ĉi sumon».

—La unuan vian peton mi ne povas plenumi, sed la duan—mi plenumos plezure kaj eĉ donos al vi ses monatojn por repagi vian ŝuldon.

Esperantigis Nikolao Petrosov

Kiam Šiller estis juna, li lernis ludi harpon. Lia najbaro, kin estis tre mal-

kontenta de liaj muzikekzercoj, foje diris al li:

«Sinjoro Šiller! Vi ludas kiel la reĝo David, sed ne tiel bone».

—Kaj vi—respondis Šiller,—parolas kiel Salomono, sed ne tiel saĝe.

—Lanternisto! kial vi ekbruligas lanternojn?

«Sed estas ja mallume! Ĉirkaŭe marŝas ŝtelistoj».

—Jen tial do mi diras: la ŝtelistoj ekvidos la lampon kaj ŝtelos ĝin.

Esperantigis Iv. Ivanov



## RAKONTO DE VARSOVIA POLICANO

Jes, miaj fratoj, ĉiajn aventurojn mi havis, sed tian okazon mi ne memoras.

Hieraŭ mi staris sur la Marŝalovskaja strato kaj vidis, ke iris ia sinjoro. La sinjoro ne estis sinjoro, sed tiel... nu, li estis suspektinda kaj li havis monon.

—Haltu! diris mi,—kien, por kio? Brakojn supren!

Li levis ilin, mi lin traserĉis, sed nenion trovis, krom monujo.

Jen kio, kara sinjoro! diris mi,—se vi donos al mi tri rublojn—mi vin lasos; se ne—bonvolu iri policejon.

Li rigardis min kolere kaj diris: «Kondukul!»

Mi kondukis lin, sed mem pensis laŭvoje: kiel mi lin prezentos al la poliestro. Kaj mi pripeusis.

—Via moŝto, diris mi al la poliestro,—mi arestis la sinjoron kum armilo.—Kaj mi montris al li mian revolveron.

La poliestro prenis la revolveron, rigardis ĝin kaj demandis:

—Ĉu vi havas rajton porti kun vi armilon?

Kaj kion vi pensas?! Mia arestito el-  
tiris el sia poŝo ateston. La policestro  
rigardis ĝin,—ĉio estis en ordo.

Tiam mia arestito prenis sian ateston,  
mian revolveron kaj iris for...

—Jen vi havas! pensis mi,—de kie  
mi trovos alian revolveron: ĝi do ne  
estis mia!...

Tradukis el la rusa lingvo V. S.



## ĈIOSTUDENTA ASOCIO

En la jaro 1909 fondiĝis internacia  
societo de esperantistaj gestudentoj, kies  
centro estas en Luhaĉovice (Aŭstrujo).  
La societo celas unuigi la gestudentaron  
de la tuta mondo en unu organizacio,  
kiu taskas la subtenadon de ĉiuj klopó-  
doj sciencaj, progresemaĵ, humanaĵ, es-  
ceptinte politikaj Membro povas esti  
krom la studentoj ĉiu progresema per-  
sono, societo, aŭ gazeto, deziranta kun-  
laboradi por la celo de la Ĉiostudenta  
Asocio. Precizajn informojn kaj provan  
numeron de la oficiala organo „Gestu-  
dentaj interesoj tuthomaraj“ donas la  
sekretario de la Ĉiostudenta Asocio,  
Vieno, XX, Klosterneuburgestr. 67. Oni  
petas aldoni 1 respondkuponon por poŝ-  
taj elspesoj.

\* \*

*Ĥuպէրանսո լեղուի հեղինակ դօկ. Լ.  
Մ. Զամենհօֆը Պետերբուրգ գտնուած  
ժամանակ ժուրնալիստներէ հետ խօսե-  
լիս ասել է.*

«—Դեռ այն օրից, որ օրից ինքս ինձ  
յիշում եմ, ես գրադուած էի միջազգային  
լեղուի հարցով: Դեռ ես գիմնագիտում  
ես իմ ընկերներէս ցոյց էի տալիս այդ  
ուզրութեամբ իմ կողմած սևագրութիւն-  
ները. 1878 թ., երբ ես Վարշաւայի 2-րդ  
գիմնագիտի VIII դասարանումն էի հս-

*պերանսոի դասազրքի սևագրութիւնն  
արդէն պատրաստ ունէի, բայց դեռ 9  
տարի ես գրադուածիցի այդ լեղուի քերա-  
կանութեան ե բառարանի կատարելա-  
գործման հարցով ե միայն 1887 թ. հրա-  
պարակ հանեցի դասազրքս:*

*Մի քանի տարի առաջ, մտաւորապէս  
1882 թ. աշխարհ եկաւ միջազգային Վօ-  
լապիւբ կոչուած լեղուն, որ յաշոդութիւն  
չունեցաւ ե այդ բանի գլխաւոր պատ-  
նառն այն էր, որ Վօլապիւբի բառերը  
հնարովի էին ե մարդս չէր կարողանում  
իւրացնել մտքումը պահել, իսկ լեղուի  
տարածման ամենամեծ խոչնդոտն էլ նրա  
քերականութիւնն էր, որ հիմնուած էր  
ձայնաւորների տեղափոխման վրայ: Վօ-  
լապիւբիստները շուտով կուսակցութիւն-  
ների բաժանուեցան. նրանց մի մասը  
հնարեց նէյտրալ լեղուն, բայց այժմ այն  
լեղուն էլ մոռացուած է:*

*Ի հարկէ, իմ լեղուի պրօպագանդային  
ես ձեռնամուխ եղայ հաւատացած լինե-  
լով, որ նա յաշոդութիւն կունենայ, բայց  
ստացած հետեանքները չարդարացրին իմ  
յոյսերը: Ռուսաստանում էսպէրանտիստ-  
ների թիւը դանդաղ էր աճում, որը կա-  
րելի է բացատրել նրանով, որ մինչև  
վերջին ժամանակներս հնարաւորութիւն  
չկար մասնաւոր ընկերութիւններ բանա-  
լու կամ խմբակցութիւններ հիմնելու:  
Միայն 1892 թ. թայտարեցին հիմնել  
Պետերբուրգում էսպէրօ ընկերութիւնը:  
Ինչ վերաբերում է արտասահմանին, այն-  
տեղ արագութեամբ բացուեցան բազմա-  
թիւ խմբակցութիւններ, ընկերութիւն-  
ներ, էսպերանտիստական ֆողովորաններ  
ե հսպէրանտոն առաջ գնաց արագաքայլ  
մանաւանդ 1894 թուից՝ այն օրից, երբ  
Բուլոն-Ֆիլլամբերում տեղի ունեցաւ հա-  
մաշխարհային առաջին էսպէրանտական  
կօնգրէսը: Դրանից յետոյ մէկը միւսին  
հետեւեցին համաշխարհային կօնգրէսները,  
ժենևալում, Գէմբրիլում, Դրէզդէնում,  
Բարնեկոնայում:*

*Ներկայումս ըստ իս, Փրանսիայում ե  
Անգլիայում էսպէրանտոն ամուր կերպով*

ყარაღაველიძენს ზ სთავს. ზრათარაკლიამ ხნ რაզმარქი მხერქერს ზ ზანტანსერ აყო ქვილიძე ზაგაძისხე ზამაჯარარაქის ზაყტრანთასიან შრომქინს, որ ამხნ თხე ზხერქაჯავიციღქინსერ იღნის; ზათ მქირმანსერ სათქვეცხენს იქხსე ვორ-ბასკათარსერქინს ზ ზხერქაჯავიციღქინსერქინს ათქორქ ზაყტრანთო ზ იქარ ზნთ აყო ქვილიძე ჯარაქერიძექინსერ იღნისაჲ. ზრათარაკლიამ ხნ ზას კათალიციანს; ზაყტრანთასიან რათარანსე ზარათანთამ ზ, ზნაროლამ ხნ რაզმარქი ზორქოხერ, որინჲ ქვიცილიამ ხნ იომანსკანს მრმანთხერქე ზ მკაკლიამ ზ ათანბქინს იან; სქტარს ხკანს მარქიქ, որინჲ ზრაკაქტქოთიამ ხნ ზაყტრანთო ქვილიძე, որინჲ ვხერქავიციღქინს ხნ მქინსე ანკამ იქხსე ილიციღქინს; სქტამ ხნ ზანკქოთ ხმ ვორქტქაქინსკქი საყაროქ ქინსილ ზამარაჲ.

\* \*

ექიმმა ზამენპოლქმა პეტერბურგში თანაშემწესთან ლაპარაკის დროს აცნობდა მას შემდეგი. იმ დროდგან, რაც მე მახსოვს ჩემი თავი, მე ვუღლებოდი აზრით სურათაშორისო ენას. ჟურ გიმნაზიაში ვჩვენებდი ხოლმე ჩემს ამხანაგებს ამ მიზანთულების შავად ნაწერებს. 1878 წლიდან, როცა მე ვიყო ვარშის მეორე გიმნაზიის, მეორე კლასის მწაფე, ესპერანტოს სხელმძღვანელმა მზად მქონდა, მაგრამ მე ცხრა წელიწადს ვდღეობდი ლექსიკონის და გრამატიკის შესაშუშავებლად და მხოლოდ 1887 წ. გავერცხლე ჩემი წიგნი. ცხატა ადრე, ესე 1882 წელს შემიღეს მეორე სურათაშორისო ენა „ვოლოაჰუკი“ როდესაც მალე მოეღო ბალო, რადგან ვოლოაჰუკისტები ძალიან ჩქარა გაიყვნენ მსკრტიებულად. ერთმა ნაწილმა დათუძენა ნეიტრალური ენა, მაგრამ ესლა ის ენაც დამწეებულა.

რასაკვირველია ჩემ სქმის გვერდებებს

შეუდგები დიდი რწმენით. მაგრამ ის შედეგი, სადმინიც მე მომხსნდა სიგოცხე, ადვილდა ეოგელ ჩემ მოლოდინს. რუსეთში ესპერანტისტების რიცხვი იზრდებოდა ნელა, რაც ახსენება იმითი რომ, ამ მოლო დრომდინ არ შეიძლებოდა კერძო საზოგადოების და წერების დაარსება. მხოლოდ 1892 წელს გახსნეს პეტერბურგში საზოგადოება „ესპერო“ (იმედი). იმავე დროს საზღვარ გარედ ჩქარა გავრცელდა დიდძალი ესპერანტისტების წერები, და ესპერანტოს პრეკუსი წავადა ჩქარი ნაბიჯით, პეტერბურგ 1894 წლიდან; რადგანც ამ წელს შესდგებოდა პირველი ესპერანტისტების მსოფლიო კრება ქალქ ბუდონ-სიურმურში. ამის შემდეგ, ერთი მეორის შემდეგ იმართებოდა მსოფლიო კონგრესები: ჟენევაში, კემბრიჯში, დრეზენში, და ბარსელონში. ნამდვილ ხსნს, საფრანგეთში და ინგლისში ესპერანტომ ფესვები მაგრად გაიღვა. იბეჭდება მრავალი ჟურნალ-გაზეთები ამ ენაზე. ბევრ ფერმების მომუშავეებმა და წარმომადგენლებმა შეისწავლეს ესპერანტული ენა და აწეო მიწერ-მოწერა ამ ენაზე; აკრთვე იბეჭდება კატალოგები.

ესპერანტული ლექსიკონი მდიდრდება; შედგენილია ბევრი ხალი სიტყვები; ადამოხმდნენ ისეთი პირებიც, რომელნიც მშვენიერად ლაპარაკობენ ამ ენაზე. ესლა მე დამშვიდებული ვარ ჩემ სქმის ბედზედ.

ნათ. ვასილი ივან—ისა



**УРОКЪ СЕДЬМОЙ**

Каждый предлогъ имѣть опредѣленное, постоянное значеніе; если же нужно употребить предлогъ, а прямой смыслъ не указываетъ какой именно, то употребляется предлогъ je, который самостоятельнаго значенія не имѣетъ;



—em—*სიძვირძვეს იანხვირ.* *babili*—*გიორს თას, ჯათაჩიხს,* *babilema*—*ჯათაჩიხი, ჯაჯანასკ.*

### მეზვიდე გაკვეთილი

ყველა თანდებულს აქვს თავისი მუდმივი მნიშვნელობა; თუ საჭიროა ვიხმაროთ თანდებულები, და პირდაპირი აზრი არ გვიჩვენებს სახელდობრ რომელი, მაშინ იხმარება თანდებულები *je*, რომელსაც მარტოდ მნიშვნელობა არა აქვს; მაგ.: *enuo je la patrujo*—*დარიდ სამშობლოსთვის; აზრის სისუფთავე ამისგან არა ზარალდება იმიტომ, რომ ყველა ენებში ამ შემთხვევაში იხმარება რომელიმე თანდებულები, ოღონდ კი ჩვეულებამ მისცეს მას საწყისი; ესპერანტული ენაში საწყისი ყველა თანდებულებზედ ეძლევა მხოლოდ ამ ერთ *je* თანდებულს. *je* თანდებულის მაგივრად აგრეთვე შეიძლება ვიხმაროთ მოთხრობითი კილო; მაგ.: *ridi lian naivecon*—*მის**

*ლიცინვა (ridi je lia naiveco მაგივრად).* ყველა სხვა მხრის სიტყვები იხმარება ესპერანტულ ენაში შეუცვლელად, მხოლოდ უნდა მიიღონ ესპერანტული ორფოგრაფია; მაგალ.: *teatro, kulturo, gazeto, studento, masino, parlamento* და სხვი.

—*ig*—ნიშნავს რამის გაკეთებას; მაგ.: *pura*—სუფთა, *purigi*—გასუფთაება.

—*ig*—გახდობა. მაგ.: *pala*—ყვითელი, *paliĝi*—გაკვითლება (ჩაფითრებული).

—*aj*—რაიმე კუთვნილებას ანუ მოცემულ მასალისგან გაკეთებულს; მაგ.: *malnova*—ძველი, *malnovaĵo*—ძველძველი; *frukto*—ხილი, *fruktaĵo*—ხილისგან მომზადებული რამე.

—*ge*—ნიშნავს ორივე სქესს; მაგ.: *patro*—მამა, *gepatroj*—მშობლები (დედ-მამა).

—*be*—ნიშნავს არსებობას; მაგ.: *bela*—ლამაზი, *beleco*—სილამაზე.

—*edz*—ნიშნავს მეუღლეს; მაგ.: *doktoro*—ექიმი, *doktorendzino*—ექიმის მეუღლე (ცალი).

—*re*—ნიშნავს უკან დაბრუნებას ახალად; მაგ.: *iri*—სიარული, *reiri*—უკან დაბრუნება; *brili*—ბრწყინვალება, *rebrili*—გამოსახვა.

—*ing*—ნიშნავს დამს, რომელშიც შეიძლება რამის ჩადგმა; მაგ.: *kandelo*—სანთელი, *kandelingo*—შანდანი.

—*ad*—ნიშნავს გაგრძელებას, ხანგრძლივობას; მაგ.: *pafo*—ტყვიის გავარდნა, *pafo*—სროლა.

—*em*—ნიშნავს ხანიათის მქონებულს; მაგ.: *babili*—ბოღვა (ლაპარაკი), *babilema*—მზოდავი (მოლაპარაკე).

სხვა უარმყოფელ სიტყვაში უარის ნიშანი *ne* გამოიშვება; შენიშვნა: *mi neniam vidis*—*მე არცროდის არ მინახავს.*

ნათ. ვასილი ივან—ისე

### E K Z E R C O J .

Fajrero bruligas fajregon. Purigu viajn manojn. Lumigu la ĉambron. La ĉambro estas lumigata de lumilo. Patro edzigas filon. Lia edzino bone preparas manĝaĵon. Instruistedzino tralegis diktaĵon. Fratoj kaj fratinoj estas gefratoj. La gepatroj nun ripozas. Gesinjoroj, volu eniri. Gelernantoj sidas en la klaso. Geaŭskultantoj estas en la universitata aŭdejo. La filino de nia riĉa parenco edziniĝas. Trankviliĝu, sinjoro, kaj trinku vian teon, ĉar ĝi malvarmiĝos. Mi vekigis je la sepa matene. Tagmanĝontoj jam kolektiĝas. Mi rimarkis lian palecon. Beleco kaj amikeco estas bonaj ecoj. Ho, senzorga infaneco! Mi havas nek fraton nek fratino. Li ankoraŭ neniam manĝis pomon. Mi eligis kandelon el kandelingo, sed baldaŭ mi remetis ĝin. Plumo estas en plumingo. La suna radio rebrilas de la spegulo. Reskribu vian taskon. Al mi plaĉas ŝia kantado. Edukado havas tre gravan rolon en la vivo de l' homo. La perolado de l' profesoro faris bonan impreson. Infano estas tre kredema kaj tre babilema. Tin tolo estas kolorperdema. Ŝi enuis je sia panjo. La unuan lecionon en la lernejo oni komencas je la oka kaj duono ma-



համարն է աշխարհ եկնում: Մոյն հանդէսը ըստ մեր հատիկ է հայկական կեանքում. նա նմաններ չի ունեցել ոչ միայն մեզ մօտ, այլև, եթէ յանդգնութիւն չի լինիլ մեր կողմից, ամբողջ Ռուսաստանում: Մենք աւելորդ ենք համարում հայի առաջ մանրամասնօրէն տալ նրա հայելին, որովհետև մենք հայերս երբէք ոչ մի գործ գնահատել չենք կարողացել, այլ կասեցք, որ ամեն մի ձեռնհաս հայ մարդ իրեն իրայ պարտք սիրտի դէն նպաստել այն հոյակապ շէնքին, որ կառուցանում է պ. Գ. Լեոնեանը հայ գրականութեան ու զեղարուեստի անապատում:

Մենք աւելի լաւ ենք համարում եւրոպական գրականութեան առաջ դնել նրա պատկերը. նա կը հասկանայ:

Ni ricevis la 3-an numeron de la armena monata revuo «Գեղարուեստ»—«Արտ».

La redaktoro de tiu ĉi revuo s-ro Gargin Leonjan estas unu el famaj armenaj artistoj, nun li estas instruisto kaj direktoro de la privata „Arta lernejo“ en Tiflis, ano de kelkaj societoj kaj konata homo en nia vivo. Li havas ĉion, krom mono. La idealismo devigis lin komenci la eldonon de tiu ĉi granda kaj, krom tio, tre artista, tre literaturriĉa revuo, unika en Kaŭkazo kaj eĉ en Rusujo. Ĝi estas miniaturo de lasta eŭropa artismo, ĝi estas unua riprezentanto de belega kaj riĉega artismo de ĉiuj landoj kaj popoloj de l'mondo. Tiu ĉi numero enhavas pli ol 50 artikolejn kaj pli ol 100 ilustraĵojn, muzikajojn, planojn k. t. p. Ni kore deziras al energia redaktoro bonegan kaj grandan sukceson.

Hajk T.-Astv.

## RICEVITAJ NOVAĴOJ

«Greklingva Esperantisto» № 4, Aprilo 1910, monata revueto, oficiala organo de la Samosa Esperantista Societo. Jarabono: Sm. 1,20 Adreso: Samos (Turkujo—Malgrand' Azio).

«Tutmonda Espero» № 29, Maja 1910, ĉiumonata revuo, organo de la Kataluna Esperantistaro. Jarabono: 1,20 Sm. Adreso: Barcelono: (Hispanujo) Paradis, 12.

«Hungara Esperantisto» oficiala monata organo de la Hungara Esperantista Societo № 1. 1910. Abonpago: 1,70 Sm. Adreso: D-ro Schatz, Budapest IV. Koronaberceg. u. 20.

«Vespera Horo» №№ 4 kaj 5, oficiala organo Esperantista por Germana Svisujo. Jarabono 2,5 Sm. («Unua Semajna Gazeto Esperantista de l'Mondo») Adreso: D-ro med. Fr. Uhlmann. Huttwil (Bern—Svislando). «Bulteno de Libera penso» № 9, Majo. Enhavo:

Björn stjerne Björnson. Kateĥismo de liberpensulo.

«Gestudentaj interesoĵ tthomaraĵ», oficiala organo de la univer. idea societo internacia de progresema gestudentaro («Ĉiŝtudenta Asocio») № 1. Majo 1910 j. (Prova numero!) Enhavo: 1. Proklamo. 2. Regularo. 3. Adresaro de komitatanoj. 4. Klarigoj por komitatanoj. 5. Niaj entreprenoj. 6. Sciigoj de la redakcioj kaj administracio.

«La Propagandisto», trimonata propaganda folieto, organo de la Internacia Propagandejo Esperantista. № 2 Junio 1910, Jarabono: 200 spesoj. Adreso: 135, High Holboru, London W. C. Krom tio, ni ricevis de redakcio de «La Propagandisto» Esperantistajn kovertojn kun teksto kvar lingva sur la dorso, kaj la poŝkartojn kun portreto de la majstro kaj teksto en Esperanto.

«Samideano ĉiumonata», in-

ternacia ilustrita literatura revuo, № 2,  
Aprilo 1910. Jarabono 2 ien (2 Sm.).  
Adreso: M. Hikosaka. 33 Abekawamachi  
Asakusa Tokio (Japanujo).

Redaktoro-Eldonisto H. Ter-Astvacatrcjan

## ANONCOJ

### Հ. Տէր-Ասուռածարեանի

ԳՐԱԳԻՐԷ ԵՍԳԻՐՆԵՑՑ ԼԵՁՈՒԻ 25 Կ.  
ԵՍԳԻՐՆԵՑՑ-ՀԱՅՏԵՐԻՆ ԲՈՒՐՆԵՆ 50 Կ.  
Կարելի է գրմել խմբագրութեան: Գա-  
նետը «Գրականներգ» գրարանութում:  
Հասցէն Тифлисъ, книжный магазинъ  
„Гуттенбергъ“ Կամ Tiflis, Librairie „Gut-  
tenberg“. 10—5

Вышли во всѣхъ отношеніяхъ художе-  
ственно исполненныя и раскрашенныя от  
руки акварелью 1-ая серия изъ 8 откры-  
токъ: 1. Портретъ Д. Заменгофа, 2 и 3  
эсперантскія пропагандныя, 4 и 5 Зе-  
дазенскій и Крестовый монастыри, 6  
варриатуры борцов, 7 и 8 варриатуры.  
Штука 10 коп., 50 шт.—4 р., 100 шт.—  
7 р., с портр. Заменгофа 5 к., 100  
шт.—4 р.

Обратиться въ редакцію.

### FOTO-CINKOGRAFIO

de

S. A. Sogomonjan

Plenumas ĉiablajn kiiŝaĵojn

Oni preparas zinkajn kaj kuprajn kliŝa-  
ĵojn por ilustritaj eldonoj kaj gazetoj,  
por prezaroj, anoncoj, landkartoj, pla-  
noj, notoj, faksimiloj k. t. p.

Oni parolas kaj korespondas esperante.

Tiflis, Puŝkina pasajo.

### JUS APERIS:

V. Papazjan. Rondaj dioj—tr. V. Sirun-  
jan—3 k.

A. Kazbek. Nino—tr. V. Gogitidze—3k.  
Havebla en la Redakcio de «Kaŭk. Esp.»

Librejo kaj Libretenejo

„G U T E N B E R G“

Tiflis, Ŝtabnaja str. d. Lazarev  
Oni havas lernolibrojn kaj aliajn librojn,  
esperantajn, rusajn, armenajn, francajn,  
germanajn, kartvelajn k. t. p. Adreso:  
Tiflis, Librejo „Gutenberg“. 5—2

Ekzercareto Esperanta

5 kop.

HUNDO kaj KATO

Armena legendo de H. Tumanjan.

10 kop.

Aĉetebla ĉe aŭtoro: V. Sirunjan, Tiflis,  
Monumenta p. № 3, kaj en la red. de  
„Kaŭkaza Esperantisto“. 10—3

LA ONDO DE ESPERANTO

«Волна Эсперанто»

Aperas ĉiumonate, krom julio.

Jarabono 1 rublo—1,06 sm.

Adreso: Moskvo, Rusland, Tverskaja, 28.  
8—3

La Redakcio kaj Administrejo de

„КАŬКАЗА ЭСПЕРАНТИСТО“

de la 1-a Julio translôgigas sur Eliza-  
vetinskajan str. domo de Prikaŝĉikov  
№ 17.

Редакция и контора газеты

«КАВЪ. ЭСПЕРАНТИСТЪ»

Съ 1-го юля

переходить на Елизаветинскую  
ул. д. Прикашикова № 17.

ВЫШЛА ВЪ СВѢТЪ  
**МЕТОДИЧЕСКАЯ**  
**ХРЕСТОМАТІЯ**

ПО РУССКОМУ ЯЗЫКУ. Ч. I.

Съ первыми уроками грамматики и правописанія, составленная учителями Тифлисскихъ 1-ой и 5-ой Мужскихъ гимназій  
 В. Джапаридзе и Я. Зедгинидзе.

Для приготов. кл. средн. учебн. зав. и  
 соответств. кл. низшихъ уч. зав.

**Цѣна 80 коп.**

Складъ изданія: Тифлисъ, Алексѣевская  
 № 11.

**ЪДУЩИМЪ**

**ЗА ГРАНИЦУ**

Редакція журнала «Кавказскій Эсперантистъ» сообщаетъ

**Безплатно**

посредствомъ Эсперанто всякія услуги: даетъ **справки, рекомендаціи, указываетъ курорты, пансіоны, гостиницы** и т. п., гдѣ говорятъ по эсперантски.

Читать, писать и говорить по Эсперантски можно научиться въ самое короткое время.

Справиться въ редакціи ежедневно отъ 6 до 7 ч. вечера.

СЪ 1-ГО ПОНЯ

дають частные уроки языка

**Эсперанто**

Курсъ 1½ мѣс., занятія по вечерамъ. Плата всеѣмъ доступна.

Приемъ ежедневно отъ 5—7 веч.  
 Справиться въ нашей редакціи.

Въ редакціи журнала «Кавказскій Эсперантистъ», Пушкинскій пассажъ и въ «Кавказскомъ О-вѣ Эсперанто» продаются слѣдующія книги:

1. Kato en botoj, tr. de V. Sirun. 10 k.
2. Hundo kaj Kato, " " 10 "
3. Rondaj Dioj, " " 3 "
4. Ekzercareto Esperanta, de V. S. 5 "
5. Nino, tr. de V. Gogitidze 3 "
6. *Դասագիրք Հայերանո լեզուի, Հ. Տ. Աստուածատրեանի* 25 "
7. *Բանարանի Հայերանո-հայերէն, Հ. Տ. Աստուածատրեանի* 50 "
8. Польный учебникъ Эсперанто, В. Сирунянъ 12 "
9. Esperanta Helplibreto 8 "
10. *Հայերանո ճիշագ. լեզուն, Ա. Օհանյանի* 3 "
11. Esperanta Legolibro, de A. Fiŝer 30 "
12. I. Turgenjev.—Kanto de triumfanta amo, tr. de A. Fiŝer 25 "
13. " Anjo (Ася) tr. de A. Fiŝer kaj V. Zamjatin 25 "
14. Poŝtkartoj kun portreto de L. Zamenhof po 2 k. 100 eks. 1 r. 70 "
15. Серія изъ 8-и открытокъ, раскраш. рукою 25 коп.

При требованіи болѣе 10 экз. дѣлается 20% скидки. Пересылка за счетъ покупателя.

La 15-an de Julio 1910 j.

Estos malfermita en Tiflis nova presejo «ESPERANTO»

Oni havos presiterareojn: esperantajn, rusajn, armenajn, kartvelajn, francajn k. t. p.

Adreso de la 1-a julio: Elizavetinskaja strato № 17, d. de Prikaŝčikov.

Съ 15 Юля 1910 года

Въ Тифлисѣ открыв. новая типографія подѣ фирмой

## Эсперанто

Шрифты на языкахъ: эсперанто, рускомъ, армянскомъ, грузинскомъ, французскомъ и проч.

Адресъ съ 1-го Юля: Елизаветинская ул. д. Прикащикова № 17.

ՅՈՒԼԻՍԻ 15-ԻՑ 1910 Թ.

Թիֆլիսում բացվում է նոր տպարան

„**ԷՍՊԵՐԱՆՏՕ**“ **ՏՆՈՒՆՈՎ**

Կունենայ տարի նետեսպլ լեզուներով.

Էսպերանտո, ասերէն, իայերէն, վրացերէն, ֆրանսիերէն և այլն:

Եւ կառուէ ամեն ձեռակ պատուէրներ ամենամառնու գնորով:

Հասցէն յուլիսի 1-ից. Նիղգանտիմսկայա փող տուն Պրիկաշչիկովի № 17.

15 ივლისს 1910 წ.

თბილისში გაიხსნება ახალი სტამბა

„**ესპერანტო**“ ფირმით

ეჭება ასოები ესპერანტულ, რუსულ, სომხურ, ქართულ და ფრანგულ ენებზედ.

შეასრულებს ყველა გვარ ზაკაზებს ხელმისაწვდენ ფასებში. აღრესი ივლისის 1-დან: ელიზავეტინსკის ქ., სახლი პრიკაშჩიკოვის № 17.